

Pos-Amiko

Printempo, numero 32

Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!

INDEKSO:

1. 2020 oficiale nuligita
1. Surpriza ĉeesto de renkontiĝoj
2. Civito fermas limojn
2. CO pligrandigas homforton
3. Akademio esploras vakcinon
3. Estraranoj timas elĉerpiĝon
4. Formortiĝo de specioj
4. NEJ-Novaĵoj
5. Horoskopo
5. Kara Koko
6. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso
kkps.klackunveno@gmail.com
http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko

Anonco de la redaktoro

Jen la unua Pos-Amiko, kiu ne aperas sur papero en Esperanto-renkontiĝo. Ne ĉar mankas papero, sed mankas renkontiĝoj. Por bone amuziĝi dum tiuj ĉi kvarantenaj tempoj tiu ĉi gazeto havas du aldonajn paĝojn!

2020 oficiale nuligita

La Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj decidis je granda plejmulto nuligi la nunan jaron 2020. La vortumo de la propono asertas, ke post malbona komenco de la jaro kaj poste diversaj krizoj rilate al la kronvirusa pandemio jam ne indas daŭrigi la jaron. La Ĝenerala Sekretario klarigis, ke ĝisnunaj rezultoj ne plu validos. Li esperas lanĉi 2021 jam post kelkaj semajnoj kaj pardonpetas pro la kaŭzita ĝeno.

(La asembleo okazis rete)

Surpriza kresko en ĉeesto de renkontiĝoj

Deviga izolado en multaj landoj nuligis multajn renkontiĝojn, inter ili ankaŭ Esperanto-renkontiĝojn. Sed la movado jam havas

longegan sperton pri tenado de komunumo malgraŭ fizikaj distancoj, kaj la konataj iloj tuj aplikiĝis por anstataŭigi surlokajn per retaj kunvenoj.

Kvankam organizantoj povus timi havi malpli da ĉeestantoj pro la malplej rekta kontakt-formo, diversaj junularaj asocioj spertis ĝuste male. Maloftaj aŭ neniamaj partoprenantoj de fizikaj kunvenoj volonte aliĝas rete. Tiu formo de kontakto ja forprenas diversajn komunikajn barilojn, kiel aliro por handikapitoj, la malebleco uzi vortaron dum konversacio, tuŝado de aliaj homoj aŭ la neceso por duŝiĝi. Tiel montriĝas, kial estas tiom malmultaj movadanoj: maloftas tiaj homoj, kiuj sufiĉe strangas por lerni Esperanton, sed sufiĉe normalas por renkonti fremdulojn en renkontiĝoj.

Ĉesu defendi kaj akceptu vian sorton. Via asocio estos integrita en la Civiton. Rezisto estas senutila.

Civito fermas landlimojn

Diversaj ŝtatoj aplikas diversajn regularojn por haltigi la disvastiĝon de la kronviruso. Interesa ekzemplo inter ili estas la memdeklarita subjekto de internacia juro la Esperanta Civito. Ĝia kapitulo, senato kaj forumo unuanime decidis (ne kalkulante la misajn voĉdonojn) fermi siajn landlimojn kaj malpermesi eliron de ĉiuj membroj kaj asocioj. Ekzistas tamen escepto por akcepti tiujn, kiuj rifuĝas de 'finvenkismaj reĝimoj'.

Volontuloj serĉataj

La Akademio Internacia de la Sciencoj serĉas helpantojn por eksperimento pri ligo inter socia izolado kaj postrenkontiĝa sindromo. Interesiĝantoj kontaktu doktoron K. Rona.

Centra Oficejo pligrandigas homforton

La monda ekonomio spertas profundan krizon kun malapero de milionoj da laborpostenoj, sed tiel ne ĉe la Centra Oficejo: male, la asocio portempe dungas aldonajn homojn. Kiel asocio kun multaj maljunaj membroj taŭga registrado de mortoj ĉiam estas malĝojiga sed necesa administra ago. Ĉar la nova viruso ĉefe minacas maljunulojn, nun

dungiĝis pliaj laborantoj, kiuj el siaj hejmoj telefonos al membroj por ekscii pri iliaj sanstatoj, eventualaj forpasoj, kaj por memorigi al ili inkluzivi UEA-n en siajn testamentojn. Tiel la nunaj oficistoj povos pli koncentriĝi pri administra malmembriĝo de forpasintoj. La trezoristo de UEA, Trezoro, esperas, ke la portempaj dungitoj repagos sin mem per aldonaj ricevitaj heredoj.

Akademio esploras vakcinon

La Akademio de Esperanto financas esploron por krei vakcinon kontraŭ mankantaj akuzativoj. Kvankam la manko ne estas vivdanĝera, ĝi trafas dekmilojn da homoj ĉiujare, ĉefe komencantojn, kiuj ankoraŭ ne estas rezistaj kontraŭ ĝi. Ĝi ankaŭ kaŭzas amason da perdita tempo pro interrompoj, korektoj kaj flankaj gramatikaj diskutoj.

La vakcino funkcius per prezentado de izolitaj sed signifaj mankantaj akuzativoj al komencantoj. La espero estas, ke ili tiel ekhavos naturan imunecon kontraŭ la eraroj, kaj la disvastiĝo de akuzativmanko tra la popolo povus esti haltigita. La unuaj testoj okazos en Francujo, unu el la plej trafitaj landoj.

Unu el la esplorcentroj. Eble vi jam aŭdis pri ĝi.

Estraranoj timas baldaŭan elĉerpiĝon de pretekstoj

La nuna krizo minacas elĉerpi diversajn stokojn da vivesencaj materialoj, kaj tiel ankaŭ en UEA. Normale la asocio havas sufiĉan kvanton da klarigoj kaj pravigoj, kial iu projekto ne progresas aŭ komitata decido ne plenumiĝas. Sed nun, kiam multaj el la estraro restas hejme plentempe, la estraranoj devis komenci reuzi pretekstojn por ne tro rapide elĉerpi la strategian rezervon. Anonima fonto en la estraro priskribas la situacion:

A.K.: “Normale estraranoj kaj komisiitoj disponas je bunta aro da senkulpigoj: vojaĝado, laboro, renkontiĝoj, vizitoj al la CO... Sed nun nur malsano kaj interretaj problemoj

haveblas, kaj tio vere limigas niajn labormetodojn.”

Poso: “Ĉu tamen samtempe ankaŭ falas la kvanto da taskoj por la asocio?”

A.K.: “Nur malmulte. Unuflanke la UK en Montrealo ne okazos, sed aliflanke la organizado de reta kunveno kun multaj maljunuloj estas ĉiam timiga tasko.”

Aliaj estraranoj ne estis kontakteblaj por komentoj pro retaj aŭ softvaraj problemoj.

Kvaranteno minacas formortiĝon de specioj

Inter la diversaj viktimoj de mondo en izolado estas ankaŭ kelkaj specioj, kiuj dependas de homoj, pli specife de homa interago. Ĉu ili iĝos la kromviktimoj de homara batalo kontraŭ kronviruso? Monde famaj organismoj kiel la gripo, malvarmumo, kaj morbilo malfacile trovas novajn gastigantojn, kaj povus iĝi nur memoro en la historio, se la krizo plu daŭros.

NEJ-Novaĵoj!

Anonco de la IJK-teamo:

Multaj el vi estis, estas aŭ estos en kvaranteno pro la kronvirusa pandemio. Flugoj estas nuligitaj, landlimoj estas fermitaj kaj diversaj (Esperanto-)renkontiĝoj fermitaj. La IJK ne estas inter ili, ĉar estas tro malfacile antaŭvidi la nederlandan kaj tutmondan situacion post pli ol 100 tagoj. Tamen ni jam faris kelkajn ŝanĝetojn en la organizo:

- Ni plilongigis la trian aliĝperiodon ĝis la 21-a de majo (anstataŭ la 14-a de aprilo).
- Ni momente ne rezervas busojn, ekskursojn ktp, kaj ni rekomendas, ke vi nun ne rezervu aŭ pagu vian vojaĝon al Nederlando.
- Ni kolektas informojn pri la situacio kaj kunsidadas por povi decidi tiam, kiam sufiĉaj informoj haveblas.

Ni vere ŝatus havi la respondon, ĉu la IJK okazos, kaj en kiu formo, sed estas nun tro frue por decidi. Ni faros oficialan anoncon je la **25-a de aprilo**. Ĉiuokaze ni trovos solvon, kiu donos plej bonan valoron al la ĝisnunaj aliĝintoj.

Sekvontaj EKU-kunvenoj:

- 18-a de aprilo
- 2-a de majo

Iru al https://events.duolingo.com/utrecht-esperanto/ por pliaj informoj.

Kara koko…

“Kara koko, mi ĉiam legas la horoskopon de Virgulino, sed fakte mi estas virgulo. Post kio mi ne plu estos?”

Kara homo,

Esti Virgulino ne dependas de sekso, genro aŭ amstato, ĝi estas mensa stato. Ĝi estas stato de profunda naiveco, en kiu homoj havas naivan bildon pri la mondo kaj starigas simplajn demandojn al saĝuloj kiel mi. Ĝi estas kuracebla per diversaj vivspertoj, kiujn ni kutimas listigi en nia vivkonsila rubriko, kiu aperas sub tiu ĉi.

Poso

P.S.: Jes, tio signifas, ke ĉiuj kategorioj en la horoskopo estas diversaj mensaj statoj.

Ĉu vi havas gravan demandon por Koko Poso? Skribu al kkps.klackunveno@gmail.com!

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Uzu vian kreativecon, kreu ion belan el necesejpapero!

Taŭro: Vi malkovros interesan arbon en via strato.

Ĝemeloj: Ŝparu pri vestaĵoj, ĉesu vesti pantalanojn. Kiu ja vidus?

Kankro: Via vojaĝo estas nuligita, kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Leono: Uzu vian tempon bone, lernu damne la akuzativon.

Virgulino: Pro kvaranteno vi daŭre restos.

Pesilo: Ĉu Koko Poso jam estas en via testamento?

Skorpio: Faru mondan vojaĝon en via hejmo, provu LSD.

Felicha: En aprilo vi sukcesos balancigi ne nur buĝetojn, sed ankaŭ vivon.

Sagitario: Se vi volas, ke aliaj tenu distancon, ĉesu duŝiĝi.

Kaprikorno: Se vi enuas, vi daŭre povas legi la komitatan liston.

Akvisto: Ne ekflirtu kun manĝilaro, viaj plantoj pli bezonas la atenton.

Fiŝoj: Vi malkovros, ke pli atingeblas najbaro ol amikaro.

Vizitu Poson dum KKPS!

Mi ne ŝatas la grizan veteron ĉi tie.

Koko Poso solas en kvaranteno en Danio. Ĉu vi volas viziti lin apud la ĉiela monto en Ravnsø ĉe Ry en novembro?

De la 31-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro 2020 okazos la 9-a KKPS. Ĉi-jare ni festos halovenon en ujutna nederlandana etoso en arbaro meze de nenie en Ravnsø ĉe Ry en Danio.

Jam eklernu elparoli Ravnsøhytten

Krom la nederlandaj kutimaĵoj kiel duontaga ekskurso, halovena balo kaj noktaj manĝoj estos ankaŭ danaj tradicioj kiel gløgg, æbleskiver kaj biero kontraŭ malpli ol eŭro (≈ 7,46 kr).

Ne estu koko, venu al KKPS!

Aliĝu jam nun ĉe **http://kkps.esperanto-jongeren.nl/2020eo:aligilo**